



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, TEL AVIVO

N-ro 68 - MAJO 1979



האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

העורך: אלכסנדר מנור

חוברת 68 - מאי 1979

# ISRAELA ESPERANTISTO

OGRANO de ESPERANTO - LIGO

EN ISRAELO

P.K.39004, Tel Avivo

N-ro 68 - majo 1979

Ĉefredaktoro:

Aleksander Manor

redaktoro:

Josef Šemer

## ENHAVO

La paco	A. Manor	1.
Prof. Einstein pri paco	A.M.	2.
Decido de la Landa Konferenco de ELI		3.
El la historio de nia Movado		3.
Dankletero de la ĉefministro		4.
Esperanto kaj "REBECIN"	N.Z. Maimon	5.
Esperanto - movado: la vojo	A. Vandel	8.
1979 - Internacia jaro de la infano	J. Giladi	10.
La kongreso de pensuloj	A. Šalamon	11.
Kia titolo gravas pli	J. Kohen Cedek	13.
Gastamo	N. Blonstein	14.
La vorto	S. Mizeruĥa	15.
Kukumaĵoj	J. Šemer	15.
<u>Angulo de J. E. L. I.</u>		
Telefonaĵo	R. Šaĥar	17.
Pri nia lingvo	D. Mager	17.
Sentimentala edukado	A. Vandel	18.
La mistero de Ĝoni		18.
Dirmanieroj		
El nia movado kaj agado	J. Šemer	19.
Volas korespondi		20.
		21.

## LA PACO

A. Manor

La paca traktato inter Israelo kaj Egiptio estas granda evento en la historio de Israelo.

La tagon de ŝia fondiĝo jenon proklamis la ŝtato de Israelo en sia deklaro de sendependeco: "Ni etendas manon de paco kaj bona najbareco al ĉiuj najbaraj ŝtatoj kaj iliaj popoloj, vokante ilin al kunlaboro kaj reciproka helpado kun la hebrea popolo sendependa en sia lando.

La ŝtato de Israelo estas preta kontribui sian parton en komuna peno por progresigo de la tuta mezoriento."

La mano etendita en 1948 estis malakceptita. La arabaj ŝtatoj preferis alfronti la ekziston de Israelo per armila forto. Kvin "oficialaj" militoj okazis inter la du flankoj, same kiel multaj sangaj incidentoj okazintaj inter la militoj - ĝis kiam maturiĝis en Egiptio la konscio, ke estas serĉenda alia vojo de rilatoj kun Israelo, la vojo de la paco.

La israela - egipta traktato ne estas aparta kontrakto. Egiptio ne apartiĝis de la araba bloko. Ĝi - kaj ni ankaŭ - vidas la pacan traktaton kiel unuan konvencion, kiu servos kiel modelo por estontaj traktatoj kun aldonaj arabaj ŝtatoj.

La paco ne estas unufoja ago de subskribo; ĝi estas longdaŭra kompleksa procezo, kiun oni flegu senĉese por atingi la celon de totala paco en la regiono.

La paco similas al bebo, faranta siajn unuajn paŝojn kaj Israelo kaj Egiptio ĝin kulturu singarde kaj racie; kun tiu ĉi espero ni kompanas la paŝojn de la paco.

A.M.

PROF. ALBERT EINSTEIN PRI LA PACO

Okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo  
(14.3.1879-18.4.1955)

Prof. A. Einstein, kiun Bertrand Russell difinis kiel "granda homo, eble la plej granda en nia epoko", la patro de la moderna fiziko, la geniulo, kiu malkaŝis la sekreton de la atoma energio - avertis la mondon je ĝia detrua uzo. En la fama interkorespondado kun S. Freud laŭ la invito de internacia institucio por establo de paco, en la komenco de la dudekaj jaroj, li esprimis sian opinion favore al fondo de "leĝofara jurista Est - raro por solvi ĉiujn konfliktojn" inter la ŝtatoj. Li diris, ke oni ne devas permesi, ke malplimulto de regantoj "humiligos pro siaj propraj aspiroj la plimulton de la popolo, kiu nur suferos kaj malgajnos de la milito."

Dudek kvar jarojn post lia morto lia nomo daŭrigas esti simbolo de du mondoj - de la scienca mondo kaj de la aspiro de la homo al pli humanaj vivkondiĉoj sur la planedo tero.

Einstein, kiu ricevis la Nobel-premion por fiziko, strebis al uzado de la atingoj de la scienco kiel ilon por establi pacon kaj nuligi la malfeliĉojn, kiujn unu homo kaŭzas al la alia.

En la jaro 1955, kiam pliakriĝis la politika streĉiteco inter Israelo kaj Egiptio, Einstein skribis leteron al la israela ambasado demandante, ĉu li povas esti utila por nia ŝtato. Li substrekis, ke dum sia tuta vivo li evitis paroli en radio aŭ televido, sed la nuna situacio ne estas ordinara. La israela ambasado tuj akceptis lian proponon.

Tri tagojn post lia morto oni trovis sur lia labortablo malnetajon por deklaro pri la sekureco de la Israela Ŝtato. Tiu ĉi nefinita artikolo aperas en la libro "Einstein pri paco", redaktita angla-lingve de Oto Natan kaj Heinz Gorden. Tie ni legas: "Mi parolas hodiaŭ al vi ne kiel usona civitano, kaj ne kiel Judo, sed kiel homo, kiu volas ĉion pritrakti objektivie. Tio, kion mi volas efektiviigi, estas simple servi laŭ mia malgranda kapableco la veron kaj la justecon, malgraŭ mi riskas nenion kontentigi."

La pritraktata temo estas la konflikto inter Israelo kaj Egiptio. Ni povas rilati al tio, kiel al sensignifa problemo kaj pensi, ke ekzistas pli gravaj problemoj. Sed tiu opinio ne estas ĝusta. Ĉar en ĉio kio rilatas al vero kaj justeco, ni ne povas distingi inter gravaj kaj malgravaj problemoj. La ĝeneralaj principoj, kiuj determinas la konduton de la homoj, ne povas esti dividitaj. Tiu, kiu ne gardas la veron en etaj proble-

moj, ne povas gajni nian konfidon en gravaj demandoj. Tiu ĉi tuto rilatas ne nur al moralo sed ankaŭ al politikaj problemoj. Ĉar ni ne povas taksi strikte kaj precize grandajn problemojn, nur kiam ni povas kompreni ilin je la fono de reciproka dependeco inter ili kaj malgrandaj problemoj..."

Laŭ tiu ĉi grava kriterio de Einstein oni devas pritrakti ankaŭ la pacon inter Israelo kaj Egiptio.

DECIDO DE LA LANDA JARKONFERENCO

de Esperanto-Ligo en Israelo (E. L. I.),  
okazinta la 15.4.1979 en Tel Avivo.

La israelaj esperantistoj,

kiuj kune kun la esperantistoj en la tuta mondo opinias, ke la Internacia Lingvo estas unu el la plej valoraj instrumentoj por semi kaj proksimigi la veran humanan pacon inter diversaj homoj kaj nacioj,

deklaras kun kontento kaj gojo, ke ili bonvenigas la subskribon de la paca traktato inter Israelo kaj Egiptio.

La israelaj esperantistoj

sendas siajn sincerajn gratulojn al ĉiuj, kiuj penadis kaj kontribuis al la kreado de la kondiĉoj por akiri la sopiratan pacon kun la plej granda araba ŝtato, Egiptio, post 30 jaroj de kruelaj kvereloj.

Ni ĉiuj esperas, ke ĝi estos vera longdaŭra paco, kiu kaŭzos ŝanĝojn de niaj najbaraj rilatoj ankaŭ kun la aliaj arabaj ŝtatoj kaj plifortigos la progreson ne nur de nia ŝtato Israelo, sed ankaŭ de la tuta mezoriento.

EL LA HISTORIO DE LA ISRAELLANDA MOVADO

Niaj unuaj esperantistoj

En novembro 1924 (!) malfermiĝis en Jerusalemo kurso de E-o, gvidata de la pioniroj N.B. Havkin kaj M. Amiel. Partoprenis ĝin 21 personoj, el kiuj 16 atingis la finon.

En la fino de la kurso okazis festeno dum kiu oni transdonis atestojn al la finintoj. La ceremonion partoprenis s-ano Muĉnik el la galilea vilaĝo Kineret, membro de la Lingva Akademio de E-o kaj tradukinto de la fama jidlingva verkisto Salom Alejĥem en E-on.

Jen la listo de la finintoj de la kurso antaŭ 55 jaroj:

Aharon Amitaj, Eliezer Deuĉ, Samuel Ĝenifo, M. Hamenaĥem, Ester Havkin, David Kohen, Pinĥas Laĥovickij, Tova Miŝkovski, J. Palti, Vital Konewka, Ahuva Kovalski, S. Kutinski, S. Rotman, Jehuda Ŝimoni, Ezra Ben-Cion Melamed, Ester Kovalski.

Ni prezentas ĉi tie la leteron senditan al E.L.I. de la buroo de la ĉefministro de Israelo. Sekvas ĝin la esperantlingva traduko.

לשנת ראש הממשלה


ירושלים, כ"ט בחשוון תשל"ט  
29 בנובמבר 1978

לכבוד  
מר אלכסנדר מנור, יו"ר  
ומר ירחמיאל גלעדי, מזכיר  
הליגה לאספרנטו בישראל  
ת.ד. 39004  
הל-אביב

א.נ.

קבלו נא את תודתו של ראש-הממשלה מקרב לב על הברכות  
לרגל ההחלטה להעניק לו את פרס נובל לשלום, יחד עם הנשיא  
אדאת.

מר בנין מאמין כי הפרס האמיתי הוא השלום עצמו. אנו  
נוסיף לעשות כל מאמץ כדי להשיגו.

בכבוד רב  
ובברכה נאמנה,  
  
י. קדיסאי  
מנהל לשכת ראש-הממשלה

B U R O O D E L A Ĉ E F M I N I S T R O

Jerusalemo, 29-an de novembro 1978

Estimataj

S-ro Aleksander Manor, prezidanto  
kaj S-ro Jerahmiel Giladi, sekretario  
Esperanto-Ligo en Israelo  
p.k. 39004  
Tel Avivo

Bonvole akceptu la elkoran dankon de la ĉefministro pro  
la gratuloj, okaze de la decido aljuĝi al li la Pacan  
Nobelpremion, kune kun la prezidento Sadat.

S-ro Begin kredas, ke la vera premio estas la Paco mem.

Ni daŭrigos penadi por ĝin akiri.

Kun granda estimo kaj fidela bondeziro,

J. Kadisaj  
direktoro de la ĉefministra buroo

ESPERANTO KAJ "REBECIN"

(El la revuo "Jidiŝe Špraf", 1958)  
Letero de N.Z. Maimon



La hebrea verkisto Deniel Perski rekomendis, ke mi turnu min al vi kun filologia demando: Ĉu ekzistas en la jida lingvo la sufikso "ecin"? Se jes, de kie ĝi devenas? Mi konas nur unu solan vorton: Rebecin (edzino de Rabeno). Ĉu estas ĝi germana finaĵo "-in", kiel ni renkontas en "Königin" (reĝino)? Kaj kiel eniĝis en "Rebecin" la litero c? Ĉu oni enmetis ĝin por eviti kolizion de du vokaloj kaj anstataŭ "Rebe-in" fariĝis "Rebecin"? Se tiel estas la afero, kial ĝuste c? Aŭ eble estis alia kaŭzo? Ĉu ekzistas en la jida similaj vortoj?

La demando leviĝis inter E-istoj. Zamenhof elektis la finaĵon "edzin" por indiki virinon edziniĝintan. Ĉe ĉiuj vortoj kaj elementoj, kombinitaj de Zamenhof, oni scias el kiu lingvo li ĉerpis; oni rekonas ilian devenon. La sola escepto estas "edzin". Zamenhof mem respondis al demando pri tiu sufikso, ke li tiris ĝin el "Kronprinzessin".

Lasttempe iu rimarkigis, ke la sufikso "-ecin" troviĝas en la jida kaj Zamenhof tiris ĝin rekte el tiu lingvo. Estas konate, ke ekde sia juneco Zamenhof forte amis la jidan lingvon (kvankam lia gepatra lingvo estis la rusa). Verŝajne li havis ian kaŭzon por diri, ke li prenis tiun sufikson el la germana, sed "Kronprinzessin" estas ofte virino ne edziniĝinta, eĉ juna knabino.

Franca profesoro, membro de Akademio de Esperanto, turnis sin al mi kun la supra demando kaj mi volas doni al li precizan, laŭeble sciencan respondon. Pro tio mi petas tre baldaŭ respondi kaj mi anticipe dankas.

Respondo de J.M.

La afero, kiun vi tuŝas, estas interesa. Antaŭ ĉio pri Zamenhof mem. Li naskiĝis en Bjalistoko kaj la unuajn 14-15 jarojn de sia vivo li pasigis en ĉi tiu urbo. Pro tio ne estas tute precize diri, ke lia gepatra lingvo estis la rusa, kvankam ne ekzistas dubo, ke dum junaĝaj jaroj li studis la rusan lingvon kaj aŭdis ĝin ankaŭ en sia hejmo. Sed la ĉirkaŭaĵo ja estis jid-parolanta. Tiel, ke li grandiĝis en du-lingva ĉirkaŭaĵo, eĉ se lia patrino parolis kun li ruse. Certe estos por vi ineterese ekscii, ke dum kelkaj jaroj D-ro Zamenhof okupiĝis pri la jida lingvo kaj verkis pri jida gramatiko kaj jida ortografio. Tiujn studojn li publikigis en la revuo "Lebn un Visenŝaft" (1909) sub redaktado de A. Litvin kaj subskribis pseŭdonime: X. Cetere, li proponis, ke oni adoptu la latinan alfabeton por la jida anstataŭ la tradician hebrean.

Kaj nun pri la sufikso "-edzin", kiun Zamenhof enkondukis en E., por indiki edziniĝintan virinon. Mi ne dubas,

ke la bazo por por ĝi estas la sola jida vorto "Rebecin". Eĉ se tio okazis ne plenkonscie, la vorto "Rebecin" - tre ege populara jida vorto, kun nekutima finaĵo - engravuriĝis en la lingva konscio de D-ro Zamenhof tiel forte, ke naskiĝis de ĝi lia propra sufikso -edzin. Malpli versaĵna estas la konekso kun "Kronprinzessin", kiu entenas kombinon de du sufiksoj, romana kaj ĝermana. Tre ĝuste vi konstatas, ke "Kronprinzessin" indikas ne sole virinon edziniĝintan, dum "Rebecin" povas virino fariĝi nur tiam, kiam ŝi edziniĝas kun "Rebe" (rabeno). Ni ankaŭ konstata, ke la vorto "Kronprinzessin" ne ekzistas en la jida, krom nur lasttempe. Ĉiuokaze, oni ne ofte uzis ĝin. Por tiu nocio ekzistas dum malnovaj tempoj "bas-meleñ" (filino de reĝo) kaj poste kreiĝis la populara "bas-malke" (filino de reĝino). Sekve restas por Zamenhof la logika - kaj psikologie komprenebla - kunligo kun "Rebecin" kaj kun tiu stranga finaĵo, kiu engravuriĝis en la Zamenhofa menso.

De kie do devenas en la jida la vorto "Rebecin"? Pri tio ekzistas kelkaj teorioj. Juda A. Joffe opinias, ke ĝia origino estas slava. Jidlingve oni nomas virojn kaj virinojn kun la aldonaĵo de slava "-ce" (konformas al la esperanta -ĉj): Jisroelce, Lejbce, Hance (de Hana) Roñce (de Rañel) ktp. Ekzistas ankaŭ: Telice (bovidino), eĉ Kalbice (bovidino) k.a. Laŭ tio fariĝis: Rebe-Rebece, kaj poste por la edzino: Rebecin. Estas malfacile akcepti ĉi tiun teorion, jam pro tio, ke "Rebecin" estas vorto tre malnova, eble pli malnova ol la sufikso "-ce" de la menciitaj ekzemploj. Juda A. Joffe mem informas, ke la vorto "Rebecin" aperas jam en la libro "Sefer Seder Naŝim" (Venecio, 1564).

D-ro Max Weinreich montris en sia studo pri la jida lingvo (Algemejne Enciklopedje, artikolo "Jidn" b.), ke "issa" en "Rabissa" (Rebecin) devenas el la romana. Li mencias paralelojn kiel "Danielissa" (edzino de Daniel), "Smuelissa" (edzino de Smuel), kiuj ekzistis ĉe Judoj en Silezio. Al tiu "-issa" aldoniĝis la ĝermana sufikso "-in". Ekestis do la jena vico: Rebe - Rebissa - Rebissin - Rebecin.

D-ro Salomon Birnbaum skribis kontraŭ tia etimologio, sed mi ne memoras liajn argumentojn.

Laŭ mia opinio ne ekzistas dubo, ke en "Rebecin" ni havas kombinaĵon de du sufiksoj: romana kaj ĝermana, same kiel ĉe "Kronprinzessin", kiun Zamenhof mencias. Tamen ŝajnas al mi, ke ne estas necese apogi sin sur silezianaj judoj, ĉar la vorto "Rebecin" estis konata jam en la 16-a jarcento. Oni devas devenigi ĝin ne de "-issa", sed de "-isso", kiun ni ricevis de spaniolaj judoj. Sendube en norda Italujo renkontiĝis ĝermanaj judoj kun spaniolaj, kiuj havis la formon "Rabisso" por "Rebe". Sama renkontiĝo okazis poste en la Amsterdama juda komunumo. De "Rabisso" por "Rebe" fariĝis la ina nomo kun helpo de la sufikso "-in". Kun tia eta diferenco oni ricevas la saman vicon, kiun ni jam mencias. Per kio tio diferencas de la teorio de M. Weinreich? Ansta-

taŭ konstrui la formon "Rabissa", pri kiu ni ne havas certan fonton kaj ni kreas ĝin per analogio kun iuj malmulte disvastiĝintaj formoj, ni metas kiel fundamenton unu formon, kiu certe ekzistis kaj estis uzita ĉe spaniolaj judoj.

Nu, el la supraj klarigoj vi povas elekti tiun, kiu plaĉas al vi, sed staru firme sur tio, ke "-edzin" en E-o devenas de "Rebecin".

(El la jida)

#### Postnoto

La supra "Letero", kune kun la "Respondo", aperis en la jaro 1958 en la jida revuo "Jidiŝe Špraŝ" (Jida Lingvo), organo de la supera jida scienca instituto "Yivo" en Novjorko. J.M. estas inicialoj de la redaktoro Judl Mark kaj la franca profesoro, menciita en mia letero, estas G. Waringhien.


La respondo prezentas tri teoriojn pri la ekesto de la vorto "Rebecin" (tiel la kutima ortografio, sed prononcata ĉiam "Rebecn". La literon c Zamenhof ŝanĝis al dz (edzino, edzo), ĉar "eco" li destinis por esprimi kvaliton.

Estas risiko, eniri en disputon kun tri korifeoj de la jida lingvo. Sed demandi oni rajtas. Kaj mi kuraĝas demandi: Se estas vere, ke "Rebecin" devenas de "Rabissa" aŭ "Rabisso", kial ne kreiĝis la logika formo "Rabessin", sed s ŝanĝiĝis al c: "Rebecin"?

La sola respondo estas laŭ mia opinio tiu, kiun mi aludis en mia letero: kombiniĝis ĉi tie la vorto "Rebe" kun finaĵo -in kaj - por eviti kolizion de du vokaloj - aldoniĝis la konsonanto c. Tiu solvo havas avantaĝon, ke ni ne bezonas serĉi influojn de malproksime.

Similan ekzemplon liveras la ĝermana lingvo, en la ĝermana oni alparolas la duan personon per "Sie" (antaŭe: Ihr), sed intime oni uzas "du" (ci). La verbo esprimanta tiun nocion devus esti: du-en (diri "ci"). Por eviti kolizion de vokaloj eniĝis z (prononcata kiel c): duzen (ducen). La sama leĝo aplikiĝas en la jida rilate "Rebe-in": eniĝis c kaj tiamaniere fariĝis "Rebecin".

N.Z. Maimon  
Usono



❁❁❁ ESPERANTO-MOVADO: LA VOJO \* ❁❁❁

Daŭrigo de la artikolo "Ĉu stagnas la movado",  
aperinta en I.E. n-ro 67

La E-o lingvo kaj movado estas maturaj, sed matureco ne nepre estas sekvota de velkado. Kiel do aspektas la estonteco de nia movado? Ĉu senespera stagno, aŭ glora triumfo? La respondo verŝajne troviĝas en la mezo, kaj forte dependas de nia estonta agado. Kie, kiel kaj kiom ni informos kaj disvastigos la aferon, kiom vastan kaj varian publikon ni atingos.

Tial la agado kiu celas al plivastigo de la kono kaj uzo de la Internacia Lingvo devas esti prioritata. Ĝi devas celi la ne-E-an medion je ĉiuj niveloj kaj atingi amasojn. De la kvanto kreskos la kvalito: eĉ malalta procentaĵo de tiuj amasoj estos triumfo. Ĉar la procentaĵo de E-o-parolantoj en la mondo (aŭ eĉ en granda parto de ĝi) pasos iun sojlan procenton, la afero rapide ekprogressos, kiel ĉeno-reakcio: pli da instancoj kaj individuoj, rimarkotaj, ke E-o estas signife uzata, ĝermos kaj uzos ĝin por internaciaj kontaktoj, sekve ankaŭ plivastiĝos la rondo uzanta E-on, kiu estos eĉ pli alloga por internaciaj kontaktoj ktp. Tiu sojla procento dependas ankaŭ de la varieco kaj internacieco de la uzado. Mi taksas ĝin inter unu kaj kvin procentoj.

Konkrete - kia estas la vojo? Tiun demandon oni devas demandi sin sur ĉiuj niveloj: supera gvidantaro, regiona, loka ĝis la individuo. Tio estas la kunteksto, kie aperas la termino de varbado. Por pli bone kompreni la diversajn direktojn de la agado farinda, ni dividu ĝin inter du medioj: interna - tiuj kiuj jam aliĝis la movadon aŭ havas kontakton kun E-o, kaj ekstera - la amasoj kaj instancoj ekster la movado. Tiuj du ĉefaj terenoj de agado povas plie esti dividitaj: La ekstera varbado - unue inkludas informadon pri E-o sur ĉiuj skaloj: amaskomunikado (televideo, gazetaro), publiko (prelegoj, afiŝoj) kaj privata.

Due ĝi inkludas instruon de la lingvo en diversaj kadroj: lernejoj, universitatoj, kultura aktivado, junularaj grupoj, publikaj kursoj, diversaj instancoj kaj persona lernado

Interna varbado povas esti dividita al: Planado de aktivado (Ekzemple, instigo al pli efika ekstera varbado) je skalo tutmonda, landa, regiona kaj loka.

Preparado kaj edukado de daŭrigantoj kaj aktivuloj, kaj instigo al pli aktiva intervena stato en la movado.

Tradicie la agado de la tutmondaj organizaĵoj estas ĉefe sur la dua tereno, de interna varbado, kaj ekstera varbado estas pli la tasko de lokaj grupoj, sed tio ne estas nepre. Kial vi jam vidis en tiu-ĉi artikolo, la plej grava tasko el la supra listo estas amasa ekstera informado kaj sekve instigo al pli efika ekstera varbado. Tiu konkludo

signife inspiras la lastatempan agadon de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Ekde la lasta jaro TEJO atribuas altan prioritaton al la temo de varbado. Tion montras nomumo de aparta estrarano kaj komisiono pri varbado, kies agado jam havas plurajn fruktojn.

Krom grandskala planado kaj direktigo de la penoj kaj rimedoj laŭ la movada hierarkio (TEJO, Landaj Sekcioj, Regiona Agado, aktivaj grupoj, individuoj), ni multe okupiĝas pri ekstera varbado kaj varbigo. Lastatempaj rezultoj de tiu agado estas:

-Planado kaj kreo de alloga, okulfrapa nacilingva varbilo en la formo de flugfolio informanta pri la lingvo, la kulturo kaj la eblecoj, kiujn ni ofertas, specife por junaj personoj. La unua versio estas por Latin-Ameriko, hispanlingva, sed ni intencas eldoni tiun varbilon kaj instigi naciajn grupojn eldoni ĝin, ankaŭ en aliaj lingvoj.  
-Por ĝenerala, pli detala informo pri E-o., TEJO kunlabore kun UEA, planas reeldonon de la 6-lingva informilo "E-o".  
-Alia ambicia projekto estas eldoni gvidilon, "principaro", kiu poste fariĝos manlibro, kiu traktos rimedojn kaj problemojn de varbado en la junulara medio. Tiu temo estas ege ampleksa kaj ni volonte akceptos kontribuojn kaj ideojn. Tamen oni ne neglektas internan varbadon, pri kio TEJO pasintjare produktis la vivecan faldfolion "Kunvenoj", kiu varbas junajn e-istojn fariĝi Individuaj Membroj de TEJO. (La nomo estas hazarda, ĉar ni opinias ke unu el la plej allogaj avantaĝoj kiujn E-o kaj TEJO povas oferti al la junularo (tamen ne nur al junularo...) estas la ebleco vojaĝi, renkontiĝi kaj kunveni en internacia medio).

La planoj estas ankoraŭ multaj, kaj en TEJO kaj en UEA. Ĝuste tio estas la faktoro kiu permesas esperi: en la unua epoko de la movado, la varbaj penoj estis spontanaj, lokaj, ne laŭ ĝeneralaj planoj kaj principoj. Ni esperas, ke la iniciato de la lasta tempo influos kaj disvastigos malsupren en la piramido - al la landaj organizaĵoj, la lokaj grupoj, ĝis la individua agemulo. Ke estiĝu kunlaboro kaj senperaj, seninterrompaj kontaktoj inter la hierarkiaj tavoloj.

Tiel fariĝos grandskala kaj kohera agado, kio, se ĝi estos sufiĉe persista kaj longdaŭra, povos puŝi la movadon de kvanta kresko al kvalita ŝanĝo - nome trans la kritikan sojlon.

A. Wandel

\* La verkinto estas Estrarano de TEJO pri varbado



 1979 - Internacia Jaro de la Infano

La jaro 1979 estas proklamita de "UNO", kiel Jaro de la Infano. Dum tiu ĉi jaro oni devas pli ol ĉiam memori pri la sorto de milionoj da infanoj, kiuj kreskas en tre malfavoraj kondiĉoj, malsato kaj malvarmo.

Mi elektis la foton de Twai Hung, kvarjara vjetnama knabino vivanta feliĉe nun en nia lando por montri, ke ne nur belaj vortoj kaj gazetartikoloj favore al mizeraj infanoj plifaciligos ilian mizeron, nek rezolucioj de "UNO" helpas al tiuj infanoj, nur iom da sentemo, iom da bonkora ago de ĉiu ŝtato kaj de ĉiu privata homo.

Twai Hung estis ankoraŭ malpli ol 3-jara, kiam en junio 1977 la boato, sur kiu ŝi troviĝis kune kun grupo da rifuĝintoj el Vjetnamio, floris sur la vasta oceano. Multaj ŝipoj preterpasis tiam proksime de tiu boato, sed neniu emis savi ilin. Feliĉe rimarkis la boaton maristoj de israela ŝipo "Juval". La israelaj maristoj ne povis indiferece rigardi kaj ne helpi al la homoj troviĝantaj en danĝero. La ŝipo savis ilin kaj venigis ilin al Tajvano; sed kiam Tajvano rifuzis akcepti ilin kaj doni azilon al tiuj vjetnamaj savitoj, la maristoj telegrafis al Jerusalemo kaj petis permeson venigi ilin al Israelo. Memorante tiam la situacion de niaj judaj rifuĝintoj el Eŭropo dum la dua mondmilito kaj eĉ kelkajn jarojn post ĝi - kiam Judoj, kiuj travivis la ĉikanojn de la nazioj en Eŭropo, same serĉis azilon (Nia lando tiam estis regata de la britaj mandataŭtoritatoj, kiuj ne permesis enmigron de tiuj malfeliĉuloj, sed ĉasis ilin kaj forsendis ilin al Cipro) - nia ŝtato decidis doni azilon al tiuj vjetnamaj rifuĝintoj.

Antaŭ 6 monatoj, denove ŝipo kun 3000 vjetnamaj rifuĝintoj vagadis de unu haveno al alia, sed neniu lando volis akcepti ilin.

Nia pacbatalanto Ejbi Natan estis tiu, kiu alarmis la "Kneset", nian parlamenton, postulante, ke nia ŝtato akceptu 400 el tiuj rifuĝintoj. Pro la tre malbona ekonomia stato la parlamento decidis akcepti nur 100 el tiuj rifuĝintoj. Antaŭ kelkaj monatoj ili alvenis kaj tuj ricevis loĝejon en la urbo Afula.

Al la solena akcepto por la novvenintoj aranĝita de la urbestro, venis ankaŭ Twai Hung, kiu parolis jam, krom la vjetnama lingvo, ankaŭ la hebrean. Si komencis ludi kun la infanoj de la nova grupo kaj instrui ilin paroli hebrean. Ŝi ankoraŭ ne scias, ke ekzistas internacia lingvo Esperanto kaj ke kreinto de tiu lingvo kaj ideo de internacia frateco apartenis al la sama gento, kiu savis ŝian vivon.

J. Giladi



Moto (latinlingve):  
Cogito ergo sum  
(Mi pensas, do mi estas)

LA KONGRESO DE PENSULOJ

Antaŭ nelonge oni aranĝis en Parizo interesan kongreson. La grandaj pensuloj de la homaro kunvenis por analizi la esencon de siaj ideoj kaj de ilia realigo.

Kiel unua parolis Moseo el Sinajo. Li akcentis, ke liaj ideoj estas rezulto de la vivpraktiko. Li estas absolute konvinkita, ke liaj ideoj venkos dum la tempo. La Dekalogo, kiun li ellaboris, por ĉiam solvos la problemon de la homa kunvivado. Kaj - se la homoj sekvos ilin - la vivo sur la Tero estos Paradizo.

Kiel dua parolis Jesuo el Nazareto. Li akcentis, ke liaj ideoj estas nur daŭrigo kaj pliperfektigo de la unua parolinto. Laŭ li la amo kaj memoferemo estas tiuj faktoroj, kiuj feliĉigos la homaron. Sed li aldonis, ke ne estas permesite, ke inter la homoj regu grandaj ekonomiaj diferencoj, ĉar tio estas la ĉefa kaŭzo de ĉiuj sociaj malbonoj. Oni devas ĉesigi la privatatan proprajon.

Kiel tria parolis Barua la Saĝa el Amsterdamo. Laŭ lia opinio en la Mondo ĉio estas unu granda "Unuo" kunapartenanta. Homoj devas en ĉio serĉi la interrilatojn. -- Bedaŭrinde la plimulto de la Homaro ĝis hodiaŭ ne komprenis lin kaj lian instruon.

Kiel kvara parolis Karlo el Trierio. Li asertis, ke dum la tempo la grandaj ekonomiaj diferencoj inter la homoj kaŭzos revolucion inter la laborantoj kaj parazit-ojn kaj en tiu revolucio la laborantoj venkos la parazit-ojn.

Kiel la kvina parolis Ludoviko el Bjalistoko. Li asertis, ke la homoj bezonas unu komunan lingvon, ke unu homo povu kompreni la alian. Li redaktis unu komunan lingvon kaj montris ĝin al aŭskultantoj. Bedaŭrinde la Mallumo ĝis nun reganta la Homaron malebligis, ke tiu lingvo disvastiĝu en tiu dimensio, ke ĝi vere fariĝu beno por la amasoj.

Kiel la sesa parolis Sigismundo el Vieno. Li asertis, ke la malbono troviĝas en tio, ke la homoj subpremas siajn dezirojn. Oni devas liberigi ilin, kaj ĉio estos en ordo. -- Iuj provis apliki lian instruon en la praktiko. Oni ne scias, kion ili sukcesis en la realo.

Kiel la sepa parolis Vladimiro la Kalva. Li asertis, ke anstataŭ teoriaj diskutoj oni devas komenci la realigon. En lia lando, kiu situas apud ambaŭ flankoj de la montaro Ural, li ekprovis efektiviigi ilin. Bedaŭrinde

la praktiko pruvis, ke la diferenco inter la praktiko kaj teorio estas ankoraŭ grandega.

Kiel la oka parolis Alberto el Ulmo. Li asertis, ke la materion oni devas diserigi kaj pere de tio konstrui armilon, kiu malebligos en la estonto la militon, kiu estas la plej granda malfeliĉo de la homaro.

Kelkaj inĝenieroj misuzis lian teorion kaj fakte konstruis iun teruran armilon, kiu superis ĉiujn mortigilojn konatajn ĝis nun. Oni ekprovis ĝin en iu azia lando - la rezultoj estis teruraj. Malgraŭ tio, la fakuloj daŭrigas la pliperfektigon de tiu armilo. Kaj senĉese. Kaj tio estos - se oni aplikos ĝin en la praktiko - la fino de la Homaro. Sed tio ne incitas ilin: ili pliperfektigas senĉese tiun teruran armilon. La multaj protestoj, kiujn la konstruadokaj perfektigado de tiu armilo provokis inter tiuj homoj, kiuj ankoraŭ ne perdis siajn homajn konscion kaj kosnciencon - praviĝis kiel tute senefektiva. La armilon oni pliperfektigas daŭre kaj neniu povas tion haltigi.

La kongreso de pensuloj post la oka parolinto fermis siajn kunsidojn decidinte, ke en la proksima estonteco oni kunvokos denove kongreson. Sed la pesimistoj asertas, ke en la estonteco tio estas apenaŭ ebla, ĉar la cirkonstancoj ne estas konvenaj por ĝi. La homaro - malgraŭ la giganta scienca kaj teknika progresoj, kiujn ĝi atingis dum la tempo - anime ankoraŭ vivas en ŝtonepoko. Almenaŭ ĝia pli granda parto. - Se oni povos venki tiun primitivecon de la homaro, tiam ni solvos la pli grandan parton de homaj problemoj. Sed ĝis tiam ni devas ankoraŭ multe atendi - kaj batali kaj suferi, por ke ni atingu tion. Do homoj komencu... La slogano estas ANTAŬEN !!! Nosce te ipsum! (latinlingve; ekkonu vin mem!)

A. Salamon



#### LA SOLVO DE LA MISTERO (de la paĝo 18.)

La murdinto eniris la ĉambron. Li vidis la fiŝon naĝantan en la akvovazo. Li tuj ascendis seĝeton, sed kiam li saltis sur la tablon, la seĝeto falis kaj rompiĝis. Li provis atingi la vazon, sed agis tiel ne lerte, ke la vazo kun akvo kaj fiŝo falis. La fiŝo mortis kaj la murdinto - la kato -, kiu ege panikiĝis, forkuris tra la fenestro. La fiŝo nomiĝis Goni.

KIA TITOLO GRAVAS PLI  
(Juda folkloro fabelo)



Klarigaj rimarkoj

1. La orient-eŭropaj Judoj ofte uzis duoblajn personajn nomojn, alkröĉinte al la hebrelingva nomo ĝian germanan tradukon. Al la nomo Arje, kio signifas - leono, oni aldonadis Loew; al Dov (signifas-urso), oni aldonadis Baer; al Zeev (signifas-lupo), oni aldonadis Wolf.
2. Kalev - estis persona nomo uzita dum la biblia brutbreda epoko; (vidu Nombroj XIII, 6). Kelev - signifas: hundo. Poste la nomo ĉesis esti aplikita.
3. Per "rabbi", kio signifas "mia rabeno", oni titolas ĉiun instruitulon; flate - gravulon. Al multe instruita persono oni aldonas la titolon "morenu", kio signifas "nia instruisto".
4. "Le-haim" estas hebree tosta saluto, invitanta aliĝi al trinkado de vino, aŭ brando k.s. Laŭvorte: "Je vivo!"

La reĝa moŝto Leono alkomisiis al sia kortegano, al la Vulpo, gravan svataferon: elserĉi konvenan fianĉon por sia filino.

Sin turnis la Vulpo al Urso. Sed pripensinte, ne trovis lin laŭrange konvena boparenco por sia mastro. Iris al Lupo kaj ankaŭ lin ne trovis deca por reĝdoma partio. Staris la Vulpo survoje en granda embaraso.

Preteriris Hundo, rimarkis la Vulpon en ĝena situo kaj demandis lin pri la kaŭzo.

Rakontis la Vulpo pri siaj malfacilaĵoj.

Respondis la Hundo per pretendema tono:

- Kial vi ne venis al mi? Ja estas publike konata fakto, ke mi havas maturiĝintan filon.

Diris la Vulpo:

- La patro de la fianĉino estas morenu rabbi Arje-Loew. Tial mi unue iris svati por lia filino la filon de rabbi Dov-Baer. Kaj mi imagis, ke lia moŝto, morenu rabbi Arje-Loew, dum la mangĉeremonio, propononte toston, intertustos plenajn vinpokalajn kun rabbi Dov-Baer kaj proklamos: "Le-haim, mia boulo, rabbi Dov-Baer!"

Kaj tiuj respondos:

- "Le-haim, morenu rabbi Arje-Loew!"

Pripensinte tion, - daŭrigis la Vulpo sian rakonton, - mi trovis, ke tamen, rabbi Dov-Baer ne indas al tia honoro. Kaj mi turnis min al rabbi Zeev-Wolf. Ankaŭ ĉi-kaŭze mi imagis, ke la reĝa moŝto dum la geedziĝa vespermanĝo levos sin kaj proponos toston proklamante:

- "Le-haim, mia boparenco rabbi Zeev-Wolf!"

Kaj tiuj respondos:

- "Le-haim morenu rabbi Arje-Loew!"



Sed ankaŭ tian kunecon mi ne trovis indkonvena. Ĉu eble vi estas "rabbi Kalev"? Ĉu al vi la reĝa moŝto povus proponi toston kaj intertuŝonte vinpokalon diri: "Le haim RABBI kelev!?"

Svingis la Hundo sian voston kaj respondis:

-Oni diras pri vi, ke vi, sinjoro Vulpo, estas ruza saĝulo. Jen mi konvinkiĝas, ke vi estas saĝmanka naivulo. Kaj aldone - konservativa regresemulo. Ĉar nur dum la pasintaj generacioj estis gravaj la titoloj "morenu" kaj "rabbi". Dum niaj nunaj modernaj tempoj gravas la titolo "lia sinjora moŝto". Kaj "sinjoro" povas esti eĉ hundo!

J. Kohen Cedek



### GASTAMO

Bedaŭrinde estas, ke la esperantistaj rondoj kaj la kursoj de E-o estas preskaŭ nur en Tel Avivo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj en aliaj lokoj nenio ŝanĝiĝas.

En T-A estas granda rondo de s-anoj, sed malgraŭ tio e-istoj de aliaj lokoj venantaj partopreni la tiean aktivecon ne estas invitataj de la lokanoj tranokti ĉe ili.

Kiam mi veturas dum pli ol unu hora de Jerusalemo al T-A por partopreni ekz. la Zamenhof-Memortagon, mi preferus resti dumnokte ĉe loka s-ano.

Ĉi-okaze mi deziras danki varme la grandan nombron da e-istoj - de Moŝav Amirim en la nordo ĝis Beer Sebo en la sudo - ĉe kiuj mi estis gastigata eble tri monatojn dum miaj unuaj du jaroj en Israelo. En la tuta lando de judaj kaj arabaj (Bejt-Leĥem) s-anoj montris gastamon.

Gastigado ŝajnas esti elstara aktiveco ne nur naci-skale, sed ankaŭ internaci-skale. Eksterlande mi tranoktis ĉe dekoj da e-istoj en deko da landoj. Mi scias, ke ne ĉiu kapablas gastigi senanonce vizitantojn, sed junuloj ofte pretas dormi en dormosako sur pura planko, aŭ eĉ tendumi, se ekzistas ĝardeno. (Mi kelkfoje uzis mian tendon - eĉ apud Natanja!)

Ankaŭ mi havis la honoron gastigi eksterlandanojn. Pasintjare gastis ĉe mi Jugoslavo, Germano, Nederlandano kaj Hungaro.

Mia adreso troviĝas ĉiam en la "Pasporta Servo" de T.E.J.O. - internacia listo de senpage gastigantaj e-istoj. Tiu ĉi listo estas la simbolo de la e-ista solidareco kaj oni povas ĝin mendi kontraŭ 10 internaciaj respondkuponoj ĉe J.M. Cash, 9 Rue Languedoc, F-78690 Les Essarts le Roi, Francio (por gastigantoj - mendo senpage).

Se vi volas gastigi en Jerusalemo, skribu antaŭe, aŭ venu senanonce: Naĥum Blonstein, 20 str. Tverja, Jerusalemo.

N. B.

### LA VORTO

Hebreoj ĝin eldiras ĉe renkonto,  
Sincere elparolas dum disiĝo,  
Kantisto disaŭdigas ĝin en kanto,  
Profetas ĝin rabeno dum la preĝo.

Kun tiu vorto eblas ĉiuj kreo,  
Feliĉo venas al hebrea dom'.  
Muzike tial sonas al hebreoj  
La multsignifa vort' "Salom".

En packonstru' unua staras trabo.  
Ni strebos, ke finluku pacprogram',  
Ke al Hebreo venu de Arabo  
La multsignifa vort' "Salam".

Triumfis en Kamp David pacideo.  
Ripetas ĝoje ĉiu nobla hom',  
Kristano, Muzulmano kaj Hebreo:  
"La Paco", "Peace", "Salam", "Salom".

Ŝ. Mizeruĝa



J. Ŝemer

### KUKUMAJOJ

Cucumis sativus (latine) -

En Nederlando ĝi nomiĝas "komkommer", en Francio - "concombre" kaj en Finnlando - "kurkku"; la Angloj nomas ĝin "cucumber", la Rumanoj - "castravete" kaj la Italoj - "cetriolo"; germane ĝia nomo estas "Gurke"; jidlingve - "ugerke" kaj dane - "agurk"; en la pola - "ogórek", hungara - "ugorka", turka - "hujar" kaj araba - "ĥijar"; svahilparolante diru "tango", hispane kaj portugale - "pepino", japane - "kjuuri" kaj en nia bela hebrea lingvo prononcu ĝin simple (...) kiel "Melafefon".

En BIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto) ni legas pri ĝi: "Legomo unujara kies pli malpli cilindroforma, akvo plena frukto nematura estas manĝata kruda aŭ konservita en vinagro."

La kukumo estis ĉiam ŝatata de la juda popolo. Jam niaj praaŭoj, la 12 triboj kondukitaj de Moseo en la dezerto, sopiris je tiu ĉi sukoza legomo kaj deziris ĝin regustumi: "Ni memoras la fiŝojn, kiujn ni manĝis en Egiptujo senpage, la kukumojn kaj la melonojn..." (Nombroj, 11.5.).

Ankaŭ dum la epoko de la 2-a Templo la judoj kutimis kulturi kukumojn en siaj ĝardenoj. Rabbi Eliezer fierakontas en Miŝna'o (volumo Sanhedrin-Sinedrio), ke li instruis 300 (!) metodojn de kulturado de kukumoj.

La kukumo estis konata kaj altprezata jam antaŭ 4 mil jaroj en Egiptujo kaj Hindio kaj pliposte - en Grekio. En tiu lasta lando oni ĝis hodiaŭ kutimas regali la manĝantojn per freŝaj kukumpecetoj inter la ĉefaj porcioj kaj kiel deserton.

La kukumo estas somera legomo, sed dank' al la teknologia progreso en la agrokulturo eblas ĝin kreskigi sub plastikaj kovraĵoj aŭ en orangĝerioj, do ni trovas la kukumojn en la legomvendejoj preskaŭ la tutan jaron.

La plej konata speco de kukumo kulturata en nia lando estas la malhelverda longa kukumo, konata kiel "nederlanda" (pro ĝia origino). En Israelo oni kreskigas ĝin dum vintro en specialaj kultivejoj kaj ĝiaj nutrad-elementoj estas pli altvaloraj kompare kun somera kukumo. La longan ("nederlandan") kukumon oni povas teni dum pli ol unu semajno ekster la fridujo, sed en la friduja legomuĵo ĝi estas konservebla eĉ dum unu monato (!).

Sed kion fari, se ni volas manĝi ilin nur post kelkaj monatoj? Por tio ekzistas marinado. Saĝa dommastrino aĉetas grandan kvanton da malmolaj kaj freŝaj kukumoj kaj preparas en grandaj bokaloj marinaĵojn por la venontaj monatoj, en kiuj la prezoj de freŝaj kukumoj verŝajne estos pli altaj.

Koncize - kukumojn oni povas manĝi en la formo de salato, sur sandviĉoj, farĉitajn diversmaniere, kuiritajn, frititajn aŭ marinitajn. Sed krom tio eblas ĝin uzi kiel... rimedon por konservi la belecon kaj junecon. La Ĉinoj proponas ĝin kontraŭ kalviĝo. In Italio virinoj kovras la vizagon per tranĉaĵoj de freŝa kukumo. Al sekhaŭtulinoj oni rekomendas maski la vizagon per "kremo" el kukuma pistaĵo. Se vi ne scias - sammaniere kondukis la fame bela reĝino Kleopatra post eliro de la lakta banujo.

Kaj antaŭ la recepto - pikantaĵon por la lingvoamantoj: La hebrea nomo de la kukumo - MELAFEFON - konsistas el du grekaj vortoj: MELON (akvomelono) + PEPON (pomo).

Bonan Apetiton!

Recepto: Salato el kukumoj kaj bulbo

Ingrediencoj: 6 "junaj" kukumoj nesenseligitaj, 2 kuleroj da salo, 1 bulbo, 2 kuleroj da oleo, 2 kuleroj da citrusa vinagro, nigra pipro kaj 4 glasoj da glaciakvo.

Preparmaniero: Tranĉu la nesenseligitajn kukumojn je maldikaj pecoj laŭ ilia longo. Aldonu la salon al la glaciakvo kaj trempu en ĝi la kukumpecojn dum almenaŭ unu horo, en la fridujo.

Verŝu la akvon (lasante iom da ĝi en la pelvo); senseligu la bulbon, distranĉu ĝin en maldikajn pecojn kaj disigu ilin en ringojn; poste miksu ilin kun la pecoj de kukumo.

Kunmiksi la oleon, la vinagron kaj la pipron kaj ŝutu ilin sur la legomojn. Atentu, ke la tuto estos kovrita kaj prezentu tuj.

Dum la manĝado venos apetito. (konfeso de la verkin-to - mi preferas kukojn ol kukumojn).

ANGULO DE J.E.L.I.

### TELEFONAĴO

La telefono aŭdigis sian voĉon. S-ro Kuki respondis: "Halo?"

"Saluton. Ĉu mi povas paroli kun Jonatan?" Demandis vira voĉo.

"Neniu Jonatan estas ĉi tie", diris s-ro Kuki. Li reiris al sia lito. Post horo telefonis iu alia.

"Saluton," diris tute malsama vira voĉo. "Ĉu Jonatan estas hejme?"

"Neniu Jonatan loĝas ĉi tie," diris la sinjoro, ĉi-foje iom senpacience.

Post duonhoru: "Halo," diris ina voĉo. "Jonatanon, bonvolu."

"Neniu Jonatan estas ĉi tie!" kriaĉis la mizera s-ro Kuki.

La telefono ripezis en paco dum du horoj. Tiam ĝi resonoris: "Saluton", diris viro. "Parolas Jonatan, ĉu iu telefonis al mi?"

Rona Ŝaĥar



### Pri nia lingvo

De tempo al tempo oni povas legi en nia gazetaro vortojn kiel "lernantas", "vokitis", "vizitontas" k.t.p., anstataŭ "estas lernanta", "estis vokita", "estas vizitonta". En la sekvantaj linioj mi provos pruvi la gramatikan korektecon de tiuj lingvouzoj.

La plimulto de la esperantaj radikoj bezonas finaĵon por iĝi vortoj. La esperantaj finaĵoj estas: la substantiva -o, la adjektiva -a, la adverba -e kaj la verbaj -as, -is, -os, -us, -u, -i. La finaĵbezonaĵoj estas ekzemple: domo, bela, rapide, manĝos. Ekzistas ankaŭ nefinaĵbezonaĵoj, ekz.: krom, sen, mem, jam ktp. Se oni volas derivi novan vorton el radiko per sufikso, oni aldonas la sufikson al la radiko kaj poste devas aldoni ankaŭ la finaĵon por formi novan vorton. Ekz.: riĉulo, vidinda, kredeble, trinkigi.

La participaj ant, int, ont kaj at, it, ot estas sufiksoj kaj ne finaĵoj, do ili kondukas kiel sufiksoj; kaj aldonante ilin al verba radiko oni devas post ili aldoni finaĵon. La finaĵo povas esti substantiva - lernanto, adjektiva - lerninta, adverba - lernonte, do kial ne ankaŭ verba: lernantas, manĝintus ktp.?

David Mager

SENTIMENTALA EDUKADO

(populara franca kanto)

Ĉi-vespere, mia bruna  
Iros ni laŭ lumo luna  
Rikolti amojn,  
Tiuj belaj floroj  
Rabas junajn korojn  
De infanoj.

Pro vi, princino mia  
Mi estas jam ebria  
De promesoj, ĉar,  
Ili, mia bela  
Igas vin kruela,  
Al via amantar'.


Morgaŭ frumatene  
Iros mi promene,  
Ambaŭ al la kamp',  
Pluki la promesojn  
Flustri la konfesojn  
Per sentiment' kaj kant'.

Tie, sur monteto  
En sovaĝa reto  
Sonĝe kuŝigos vi,  
En miaj brakoj, bruna  
Kun argento luna  
Mi alprenos vin.

Vortoj: J-P Kernoa  
Tradukis el la franca: A. Vandel

La krepusko rozas  
Facila vento blovas  
Kaj sekigas larm',  
Ni devas, stultuleto,  
Foriri de l' monteto  
Al la hejma varm'.

Vorton eĉ ne unu  
Eĉ ne al la luno,  
Silentos nia kor',  
Postetute sole  
Disiĝos ni senvole  
Restos nur memor'.

LA MISTERO DE ĜONI

Kiam mi eniris la ĉambron, mi ne kredis al miaj okuloj:

Ĝoni kuŝis sur la planko, morta. Apud li estis kelkaj gutoj da akvo.

En la ĉambro regis terura malordo. La seĝeto estis rompita. La tablotuko estis ĉifita, fenestro estis malfermita kaj ĉie ajn sur la planko vidiĝis piedspuroj. Mi kuris al la fenestro kaj rigardante tra ĝi mi povis vidi la murdiston de Ĝoni.

( La solvo de la mistero-sur la paĝo 12.)

DIRMANIEROJ

Vivu la malgranda diferenco! diris la miliono al la milono.

Se mi estus Rotŝild... diris la samideano, post kiam li aŭdis la prezon de aliĝo al la 64-a Universala Kongreso en Lucerno (Svisio, 1979).

En ĉiu objekto troviĝas difekto, diris la svatisto al la plendema kliento.

Vi estas obstina kiel mulo, diris la ĉevalo al la azeno.

Ne staru en mia vojo, diris la formiko al la elefanto.

Vostojn mi ne ŝatas, diris la serpento al la vulpo.

Benata estu lia MEMORO, diris la studento pri sia forgesema profesoro.

Ne krokodilu, diris la aligato al siaj lernantoj.

Via humuro estas tro seka, diris la fiŝo al la meduzo.

Eble ni manĝu bulkojn? diris la ja-PANO al la eŭro-PANO.

Dank' al vi mi ne timas katojn, diris la muŝo al sia supersigno ("^").

"Ĝis!" diris la mortanto al siaj ĉirkaŭantoj.

Iru al Diablo, diris Satano al sia edzino.

Tempo estas mono, diris la milionulo, kiam li ricevis la unuan premion en la kurkonkurso.

La mono jes odoras, diris la riĉa ŝejko el la Persa Golfo.

Ĉu ni geedziĝu? diris la erinaco al la broso.

Vi estas tre altira, diris la metalo al la magneto.

Bonvolu eniri unu post la alia, diris la kribrilo al la faruneroj.

Deprenu vian manon! diris la manilo al la fraŭlo.

Ĉu ankaŭ vi, BRUTO? diris la brutisto al la bovo.

J. Ŝemer



NOVA ESTRARO

Dum la Landa Jarkonferenco de E.L.I. okazinta la 15.4.79 estis elektita nova Estraro:  
 A. Manor, N. Drezner, J. Giladi, D. Vunderbaum. d-ro H. Mašler, E. Haroun, H. Haroun, R. Alberg, N. Israeli, J. Ben Alter, M. Braña, J. Tilleman, R. Klajman, A. Vandel, J. Semer, E. Zalcmán, M. Landaŭ.

LA KURSOJ EN LA JARO 1978/79

J. Murjan: Kurso en la Junulara Domo  
 Kurso por mezlerneĵanoj  
 J. Giladi: 3 kursoj en Kfar Saba  
 H. Mašler: 2 kursoj en la Junulara Domo  
 1 kurso por la progresantoj (en la klubejo)

J. Ben Alter: Kurso en "histadrut" en Petaŭ Tikva  
 D. Vunderbaum: Kurso en sia domo  
 N. Drezner: Paroliga kurso en sia domo

NOVAJ SAMIDEANOJ

Arje Noj, Raŭel Jadlovker, Avi Matos, Osnat Nojhaus, Sara Nojhaus, Noomi Miŭaeli, Malka Avior, Dori Ginsburg, Sulamit Monkovicki, Iris Noj, Hana Snapir, Ester Wiener.

DONACOJ

Frida Kibel (anstataŭ honorarion al d-ro Mašler) 500 IL

D-ro A. Vedrine (200 fr. frankoj) (Lyon- Francio)	1000	IL
Henrik Karlson (Svedio)	300	IL
Jaakov Lev	150	IL
Efrati Cvi	500	IL
Kibel Frida (aldono)	100	IL
Ben Jaakov Baruŭ (kotizo kaj donaco)	200	IL

Al ĉiuj tre koran dankon!

E. L. I.

JARKOTIZO POR E.L.I.

Samideanoj kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon por la jaro 1979 (100 IL.) estas petataj plenumi sian samideanan devon.

(En la bulteno estas poŝtbankĉeko.)

Koran antaŭdankon!

AL NIAJ LEGANTOJ EN EKSTERLANDO

Jara abonprezo por Israela Esperantisto estas 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

VOLAS KORESPONDI

Julio Patkós, H-5000 Szolnok, Ady E. st.56. II.e.  
 Hungario, serĉas filateliston por interŝanĝi poŝtmarkojn.

Puškaŝ Vladimir, U.Vojvodinaput P.T. 46, 25001 Sombor,  
 Jugoslavio: 31-jara vegetarano, kolektas p.m.

Iluĉjo Gercikov, 483310 Talgar-2, Alma-Ārinskaja obl.  
 Komunistiĉeskaja 278, Sovetunio: Denaska esperantisto;  
 interesiĝas pri flugantaj objektoj.

S-ro Fabio Vivoda, Via 25 Aprile, 4, I-34074 Monfalcone-  
 Go, Italio. Lernas la hebreaan lingvon kaj deziras esti  
 helpata de israelaj s-anoj.

Ivan Ĝernaev, Toŝo Taŭĉiev 33, 4000 Plovdiv, Bulgario:  
 pensiita juristo.

S. Bueno de Mesquita, Prinser Annalaan, 2263 x c 223,  
 Leidschendam, Holland; Judo, dum longa tempo ano de UEA.

Dipl. Ŭk., Ing. Rolf Schwenke, DDR - 83 Pirna, Carl-Maria-  
 von-Weber-Platz 5; 30-jara, needziĝinta, ekonomikisto kaj  
 inĝeniero de giso; li volonte vojaĝas, kolektas p.m., inter  
 ili de Israelo.

Félix Martin Triep, Doctor Alcay, 12.3.º C, Zaragoza-6  
 Hispanio, serĉas korespondamikon.

Daniel Houguet, 13 Rue du Pradonnais, F-44350 Guérande,  
 Francio: 35-jara instruisto, komencanta e-isto; pacisto,  
 naturŝatanto, sindikatisto.

Maria Marinova Siderova, Vasil Kolarov 45, 5500 Loveĉ,  
 Bulgario: 36-jara apotekistino.

Ernesto Schlesinger, p.k. 35, R-3400 Cluj, Rumanio ser-  
 ĉas seriozajn interŝanĝantojn de bildkartoj.

J. Pierre kaj Jacqueline Fomarty, Ecole publique, Razak de  
 Saussignac, 24.240 Sigoules, Francio; ĝeinstruistoj, in-  
 teresiĝas pri Freinet-movado (moderna lernejo).